

FF



Kulturaj Kajeroj

TRIMONATA INFORMADA KAJ KULTURA REVUO
REVUE TRIMESTRIELLE DE CULTURE ET D'INFORMATION

Direktoro : P. BABIN, eks. prezidanto de la Kulturdomo de Francilingvaj Esperantistoj

J A R A B O N O

Jarabono : 80 fkoj { P. BABIN
Le Haut des Bourrellières
17, rue Romain-Rolland
85100 Le Château-d'Olonne
P.C.K Nantes : 2.813.61 L
(Vidu la liston de niaj perantoj sur paĝo 4)

1998 - 3 - 4

(JULIO - DECEMBRO)

EN TIU ĈI NUMERO

vi povos legi pri...



... la « Latina Kvartalo ».



... kaj la « Berlinaj salonoj ».

KULTURAJ KAJEROJ

TRIMONATA INFORMADA KAJ KULTURA REVUO

REDAKCIA KOMITATO:

Jeannine VINCENT
26bis, rue de Milngavie
F-49150 BAUGE

Pierre BABIN
17, rue Romain Rolland
F-85180 CHÂTEAU D'OLONNE

ENHAVO

paĝo

El Grésillon	1
Esperanto tra la Mondo	2
La Latina Kvartalo	3
Paul Berthelot	4
La Berlinaj Salonoj	5-6
Vidocq (fino)	7-9
La lasta printempo de Saadi	10-11
Diablo trompita de virino	12-13
Por via Distro	14
La Vivo en Grésillon	15-16

EL GRESILLON

Sur la paĝoj 15 kaj 16 de tiu ĉi numero vi trovos la raportojn pri la Ĝenerala Kunveno okazinta la 31-an de oktobro kaj la Komitatkunveno, kiu sekvis la 1-an de novembro. Tiu Ĝenerala Kunveno ne povis okazi, kiel kutime, dum la dua trimestro. Do, estis pritraktitaj la kulturaj kaj financaj rezultoj de la jaro 1997. Sed granda parto de ĝi estis dediĉata al diskutoj, kelkfoje viglaj, pri la estonto de la kastelo. Por kelkaj, savenda estas la kastelo mem, juvelo de la esperantista mondo, plena je karaj memoroj por multaj; por aliaj savenda estas la kooperativa asocio, kiu posedas la kastelon, sed povus funkcii en alia loko. Kies prizorgado estus malpli kosta. Al la proponoj faritaj de la Komitato respondis 210 membroj. La unua (serĉado de mecenato) ricevis 48 voĉojn, la dua (vendo de la kastelo) ricevis 98, la tria (daŭre alvoki pri mondonacoj) ricevis 64 voĉojn. La dua propono ricevis la plimulton da voĉoj sed ne la plejmulton. La komitato decidis ne konsideri la duan proponon, sed daŭre peti monhelpon.

Pro laŭstatuta renoviĝo de duono de la komitato estis necese elekti novan estraron. La prezidanto D. Babin, kiu subtenis la duan proponon, ne kandidatigis. Neniu alia membro de la nova

komitato konsentas kandidatiĝi. La asocio estas senprezidanta ĝis la 17-a de januaro, kiam okazos nova komitatkunveno de la asocio en Bouresse.

La Fonduso Sekureco daŭre ricevas viajn mondonacojn.

Sendu ilin al poŝtkonto en Nantes 1485-39 P, aŭ al nia UEA-konto Gres-y.

NI FUNEBRAS: De post la apero de la antaŭa numero de Kulturaj Kajeroj pluraj malĝojigaj informoj venis al ni el kiuj tri pri la morto de geamikoj bone konataj de la vizitantoj de Grésillon.

Gaëta, la edzino de Léo Robert, Jacques Hibon, edzo de Marta, Madeleine Gibeze.

Ĉiuj el ili helpis Grésillon per sia regula partopreno dum staĝoj, per gvidado de kursoj aŭ administrado de stud-periodoj. Al iliaj familianoj iras niaj plej elkore amikaj sentoj. La malaperintoj tenas sian lokon en la memoro kaj la vivo de Grésillon,

ESPERANTO TRA LA MONDO

LA UNIVERSALAJ KONGRESOJ -

Dank'al la sindonemo de multaj francaj esperantistoj, la 83-a universala kongreso de esperanto, kiu kunigis en Montpellier, la unuan semajnon de aŭgusto, pli ol 3 000 partoprenantojn el 70 landoj, estis sukcesa granda manifestacio dum kiu okazis multaj interesaj aktivaĵoj, ankaŭ parte por la urbanoj. La nova prezidanto de UEA estas nun S-ro Ken Enderby, aŭstralia eksministro. Inter la 31-a de julio kaj la 7-a de aŭgusto la nova germana ĉefurbo, Berlino, akceptos la 84-an universalan kongreson. La federacia prezidento Roman Herzog estas la alta protektanto de la kongreso kaj eminentuloj jam eniris la honoran komitaton. La temo de la kongreso estos: "Tutmondiĝo - ŝancoj por la paco?" La esperantista Nobel-premio Reinhart Selten estos la rektoro de la Internacia Kongreso-Universitato.

La SAT-kongreso okazis en Odeso (Ukrainio). Ĉeestis 223 gesamideanoj el 23 landoj. En 1999 la kongreso havos lokon en Karlovy-Vary (Ĉeĥio) de la 24-a ĝis la 31-a de julio.

Ankaŭ en Karlovy-Vary, de la 7-a ĝis la 13-a de aŭgusto okazos la konferenco de ILEI (Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj), pri la temo: "EDUKADO AL PACO".

La vilaĝo Glay (departemento Doubs) akceptos la 54-an Kongreson de SAT-Amikaro, la 3-an, 4-an kaj 5-an de Aprilo. Informas: Roland Cuenot, 35 rue de Villers, 25700 - Valentigney. Tel. 03.81.34.64.46.

La franca urbo Le Mans akceptos (8-15an de majo 1999) la internacian kongreson de la esperantistaj fervojistoj (IFEFF).

ESPERANTO KAJ INTERNET -

Sub formo de elektronika korespondado, kursoj de esperanto en pluraj lingvoj kaj gradoj, forumoj, informaj paĝoj, la uzado de esperanto estas pli kaj pli ampleksa sur la reto Internet.

BRASSENS EN ESPERANTO -

Pere de la agrabla voĉo de Jacques Yvart, eksmuzikisto de Brassens, vi povas nun aŭskulti sur kompaktdisko, kelkajn kanzonojn de la populara franca kantisto-poeto. Eldonis ĝin: Eurokka, 31450 Donneville, Francio. Akompanas dulingva teksto.

LASTAJ ELDONAĴOJ -

La konata eldonejo L'Harmattan publikigis, sub la titolo "Parlons esperanto", tre interesan esperanto-gramatikon de Jacques Joguin. La unuaj 32 paĝoj estas dediĉitaj al bone informita prezentado de la lingvo kaj movado. Fine de la libro, la aŭtoro traktas la evoluadon de esperanto kaj komparas ĝin kun la aliaj lingvaj sistemoj.

Ĉu necesas prezenti Bruno kaj Maryvonne Robineau, la francajn esperantistojn, kiuj migris tra la mondo dum pluraj jaroj. Ilia franclingva libro: "Et leur vie c'est la terre" estas nun aĉetebla en esperanta traduko: "Ili vivis sur la tero" La paro povas prezenti prelegon kun bildoj en esperanto aŭ en franca lingvo por la ĝenerala publiko. Jen la adreso: Ge-roj Robineau, Le Moulin Boireau, 49270 Landemont (Francio)

"Antologio Latina", tradukoj de Gerrit Berveling. Du volumoj. Volumo 1: Maturiĝo (ĉ. 250-30 a. Kr.); Volumo 2: epoko de Aŭgusto.

"Esperanto post la jaro 2 000"; Diskutkajero de A. Korĵenkov. Bazo por diskutoj por nia estonta agado.

"Antologio de la serba Poezio (1200-2000) 499 paĝoj.

"Internaciaj ekzamenoj de ILEI/UEA" Tiu gvidilo helpas novajn kandidatojn por prepari tiujn ekzamenojn.

Nova eldono de "Franca Antologio" en ses volumoj. Temas pri ĉiuj literaturaj numeroj de "Franca Esperantisto". Por grupaj bibliotekoj kaj ekspozicioj.

"Pajleroj kaj stoploj" - Ankoraŭ ne eldonita en volumo de tekstoj de W. Auld. 348 paĝoj.

NIA LIBRO-SERVO POVAS DISPONIGI AL VI TIUJN LIBROJN. ADRESO: J. VINCENT 26 BIS RUE DE MILNGAVIE 49150 BAUGE.

LA LATINA KVARTALO

Dum jarcentoj la plej elstaraj francaj kaj eĉ alilandaj verkistoj kunvenis en drinkejoj, kies nomoj restas en la historio de la literaturo: Villon ĉe Placo Maubert, Racine, Molière, Boileau ĉe La Pomme de Pin (La Pinkonuso), Voltaire ĉe Procopé, Vianv. Dumas, Balzac ĉe Café Tabourey, Mallarmé, Verlaine, Coppée, Richépin ĉe Café Voltaire, Zola, Goncourt, Daudet ĉe Le Coucou (La Kukolo), aliaj en La Vachette, La Closerie des Lilas, ktp. Ĉiuj drinkejoj kaj tavernoj troviĝas en la sama parto de Parizo, sur la "Maldekstra Bordo" de la rivero Seine, en la tiel nomita "Latina Kvartalo". Magiaj vortoj, kiuj memorigas al multaj Francoj kaj alilandanoj la estintajn studentajn jarojn. La Latina Kvartalo, kie naskiĝis kaj plifirmiĝis tiom da talentoj; kie oni ankoraŭ tumultas sed ankaŭ multe studas; kie oni multe pensas kaj parolas pri la estonto en la plej diversaj lingvoj; loko kiu modernigiĝis sed konservas la premsignon de la antaŭaj ok jarcentoj.

Dum la Romiana Epoko, Parizo estis Lutèce, urbeto konsistanta el kabanaro. Sur la maldekstra flanko de la rivero etendiĝis plataĵo arbo-kovrita nomita Mons Leucotius. Tiu plataĵo fariĝis la luksa suburbo de Lutèce kaj tie staris la Arenoj kaj la Termobanejo. La Barbaroj tute detruis la konstruaĵojn sed, en 507, la reĝo Clovis konstruigis tiuloke grandan preĝejon post la venko en Vouillé. La Mons Leucotius fariĝis Monto Sainte Geneviève. Sed la Normanoj detruis ĉion sur la monto. Nova preĝejo estis konstruita kaj abatejo aldonita; ambaŭ estis protektitaj de la papoj kaj reĝoj. Pro tio, en 1150, post konflikto kun la episkopo Abelard, unu el la plej eminentaj tiamaĵ magistroj, translokiĝis al la "Maldekstra Bordo", kun siaj studentoj kaj tiamaniere komenciĝis la historio de la Latina Kvartalo.

La alveno de la studentoj en tiun pacan kvartalon de abatejoj, preĝejoj, kampoj kaj vitejoj, estis granda okazaĵo. Oni konstruigis loĝejojn. La studenta korporacio klopodis akiri privilegiojn. Ili ne estis submetitaj je impoŝtoj kaj batal servo. Ili grupiĝis laŭ siaj originoj kaj laŭ siaj studoj en "naciojn" kaj "fakultatojn". La kunvenoj okazis en preĝejoj, la kursoj sur la stratoj. En la XIII-a kaj XIV-a jarcentoj unu el la

plej-gravaj studocentroj estis la strato de Fouarre. En la malnova franca lingvo la vorto "fouarre" signifas "pajlo". Tiu nomo de la strato devenas de la fakto, ke la studentoj sidis sur pajlo, surstrate, dum la magistro parolis de alta fenestro. La studentoj devis enkapigi ĉion ĉar ekzistis neniu kraĵono kaj neniu kajero. El ĉie en la mondo venis la studentoj. Estis necese konstrui novajn loĝejojn ĉar la plej granda parto el ili dormis en keloj aŭ sub la porĉoj de la preĝejoj. Ili akiris monon almozpetante aŭ eĉ ŝtelante. Specialaj domoj estis konstruitaj ĉefe de alilandanoj por siaj samnacioj. Oni nomis tiujn domojn "kolegioj".

Kapelpastro de la reĝo Ludoviko la XII-a, Robert de Sorbon (Sorbon estis verŝajne la nomo de lia naskiĝloko), opiniis, ke estus bone loĝigi en sama konstruaĵo la studentojn kaj la magistrojn. Tiamaniere naskiĝis la fama Universitato Sorbonne; Baldaŭ la kursoj okazis en la kolegioj mem. La tuta aspekto de la Latina Kvartalo ŝanĝiĝis ĉar la studentoj ne plu vagadis surstrate. Sed daŭre okazis bataloj inter ili kaj la "burĝoj". Kiam studento estis malkaresita ankaŭ la magistroj ribelis.

La 13-a, 14-a kaj 15-a jarcentoj estis la epoko de la universitata apogeo, la epoko de Dante, Bacon, Erasme, Rabelais. Sed en 1445 la Universitato perdis parton de siaj privilegioj kaj estis submetita je la Parlamento. En 1452 ĝi ne plu rajtis enmiksiĝi en politikaj aferoj. Francisko la 1-a decidis la konstruon de Reĝa Kolegio, kie oni instruis en la franca lingvo anstataŭ la latina. La instruistoj estis eksterekleziaj kaj pagitaj de la Ŝtato. Tie oni studis ne plu nur la teologion sed ankaŭ lingvojn (hebrean, grekan, latinan, araban kaj ankaŭ matematikojn, medicinon, kirurgion, anatomion, botanikon. Tiu Kolegio nomiĝis Franca Kolegio kaj ankoraŭ ekzistas. Poste Richelieu rekonstruis la Sorbonne.

De tiu tempo aldoniĝis multaj aliaj konstruaĵoj dediĉitaj al studoj. Multaj ŝanĝoj okazis. Ekzistas nun nur parto de la antaŭa strato de Fouarre. La tuta vivo de la kvartalo translokiĝis al bulvaro Sankta Mikaelo. Sed ankoraŭ pli ol dum la unuaj jarcentoj venas alilandaj studentoj tien. Ĉiuj interkonatiĝas, amikiĝas, ludas, laboras diskutas kune. Studado, amikiĝo: duobla aspekto de la Latina Kvartalo.

PAUL BERTHELOT

Esperantista Katalunisto kaj Kataluna Esperantisto (1881-1910)

Veninte el Paris, oficiale pro sankialo, Paul Berthelot instaligas en Rusiljono en 1903. Lia vigla esperantista agado tenas lin en proksima kontakto kun parizaj esperantistoj., el kiuj Paul Fruictier, redaktoro de la monata "Lingvo Internacia" presita en Szegszárd (Hungario). Kiam la hungara presisto instaligas en Paris, P.B., tipografo ĉe Lamiot en Céret, presos la numeron 9 - septembro 1904 - de tiu periodaĵo. Tiu numero entenas raporton pri vojaĝo ĵus farita de P.B., "Tre fremda lando". Por P.B., perfekta esperantisto, tiu lando povas esti nur fremda, ĉar Esperanton tie oni praktike ne konas: "Tiu lando estas Katalunio, regiono, kiu entenas etan parton de franca tero kaj riĉan parton de la hispana tero. Lando disŝirita pro la politiko, perturbita pro la lingvobatalo..."

Tiu aludo al la politika kaj lingva centralizado de la hispana kaj franca ŝtatoj montras la penson de P.B. Fakte ĝi reprenas la proklamadon de Prat de la Riba, prezidanto de la "Lliga Regionalista" fondita en 1901: "Katalunio estas nia sola patrujo". Iom poste, en 1906, Prat de la Riba publikigas "la nacionalitat catalana", difino de la kataluna identeco, markante la diferencon inter "regiono" kaj "nacio", kaj ĝin etendante al ĉiuj landoj kun kataluna lingvo: Kataluno certe sed ankaŭ Balearoj, Valencia regiono, Andoro, Rusiljono.

Barcelono boladas. La personeco kaj ideoj de Prat de la Riba iĝinta prezidanto de la "Diputacio" (Ĉambro de la Deputitoj), profunde stampas la katalunan vivon sine de la hispana ŝtato, sed en "Lingvo Internacia" P.B. parolas pri "kataluna regiono" etendiĝanta ambaŭflanke de Pireneoj.

"La sendependulo" de la 22-a de decembro 1904, sub la titolo "Esperanto kaj kataluna lingvo", dissendas la alvokon de "l'Aplech Esperantista de Catalunya" kies duobla sidejo estas en Figueres kaj Céret. Tiu alvoko kvazaŭas naskiĝdaton subskribitan de F. Ribot, artileria kapitano en Barcelono, E. Segarra el Manresa, Salvador Dali patro, notario en Figueres, Jean Baron instruisto en Perpignan kaj Ed. Agramon negocisto en Céret. La nomo de P.B. ne estas. Nur en la unua numero de la bulteno de "l'Aplech", "Espero de Katalunujo"

presita ĉe Lamiot en Céret kaj anoncita de "la sendependulo" de la 10-a de marto 1905, ni scias, ke P.B. estas "provisional secretari de l'Aplech". Parenteze "Katalunjo estas la fonetika traduko de "Catalunya". Nun ni diras "Katalunio".

En tiu sama 8-paĝa numero de la bulteno, P.B. anoncas sian venontmonatan prelegon en la Politeknika Asocio de Perpignan. La morgaŭan tagon Gustave-Adolphe, kronikisto de "la sendependulo", raportas pri ĝi. "Espero de Katalunjo" anoncas la ĝeneralan kunvenon de l'Aplech en Barcelono, la 24-an de aprilo. Ambaŭflanke de Pireneoj, la gazetaro raportas pri ĝi. Krom la ĉefaj animantoj kaj delegitoj de "l'Aplech Esperantista de Catalunya" partoprenis E. Boirac, rektoro de Dijon-Akademio, eminenta esperantisto, rusiljona pro edziĝo, kiu ofte venis en Salses, kie li mortis en 1917. Ankaŭ P.B. ĉeestis.

Ĉar "Espero de Katalunjo" ne plu libere aperas, en la unua numero de la gazeto "Esperanto", kiun li publikigas la 18-an de junio 1905, P.B. raportas pri la fondo de la "Esperantista Kataluna Federacio". La vorto "Federacio" estas nova. Post legado de la leteroj de Th. Cart, vicprezidanto de la "Société Française pour la Propagation de l'Esperanto" (SFPE) kaj de la rimarkoj de V. Inglada Ors ĉeestanta kaj reprezentanta la "Société Espagnole pour la Propagation de l'Esperanto" (SEPE), la statutoj de la "Esperantista Kataluna Federacio" estis aprobitaj en Barcelono.

La 13-an de junio 1905, P.B. estas akceptita de la "Société Agricole Scientifique et Littéraire" (SASL) de Perpignan. Li parolas pri la "utileco de internacia lingvo" laŭ la verkaĵo de la filozofo Louis Couturat, motoro de la "Delegacio por la adopto de internacia lingvo", kiun li fondis post la pariza universala ekspozicio de 1900, kaj kiu, kunvenonte en Collège de France en oktobro 1907, devis preni decidon.

P. Maniel, iama estro de la lernejo St-Martin de Perpignan (nun lernejo Paul Bert), protokolis la paroladon de P.B. en la 47-a volumo (1906) de la SASL en dek paĝoj. La vorto "Esperanto" tute ne aperas.

En sia numero 15 de la 1-a de aŭgusto 1905, "Lingvo Internacia" publikigas la ĵenan leteron de P.B.: "Laŭ la lasta decido de la Komitato de la Esperantista Kataluna Federacio, la grupa bulteneto aperas nur post speciala decido de la Komitato kaj estas dissendita nur al la

Daŭrigo sur paĝo 10

LA BERLINAJ SALONOJ

La salono ne estis eltrovaĵo de Germanoj. Jam en la mezepoko la nobelaj sinjorinoj de Tuluzo kunvenigis aristokratojn kaj trobadorojn en siaj kasteloj, kaj instigis la krudajn militistojn al la kavalireca kulturo. En la salono de la markizino de Rambouillet, en la 17-a jarcento, kunvenis aristokratoj, kleruloj kaj beletruloj por konversacii kaj estiĝi la francan klasikismon; ĉiam, en Francio, la mastrinoj de tiuj kunvenoj estis sinjorinoj de la alta aristokrato, kaj en Berlino... estis junaj judinoj! Henriette Herz kaj Rahel Varnhagen. Nun vi demandas min: "Ĉu la Judoj en la Berlino de la Klerismo estis vere samrajtaj?" Ne, tute ne! La plejmulto de la profesioj estis malpermesitaj al Judoj, kaj la juna Moses Mendelssohn estis tolerita en Berlino nur ĉar li havis riĉan kaj influricĉan protektanton. Sed sekve de la Klerismo kaj danke al la filozofo Mendelssohn, la berlinaj Judoj emancipiĝis kaj fariĝis pli kleraj ol la alia loĝantaro. Henriette Herz klarigas la strangan fenomenon de la berlinaj salonoj: "La kristanaj domoj de Berlino ne prezentis spiritan societemecon, kiu estintus samvalora aŭ nur simila al tiu, kiun prezentis la judaj... Tie (ĉe la kristanoj) ekzistis honoraj burĝaj virtoj, sed ankaŭ spirita malvasteco kaj malklereco."

Henriette de Lemos naskiĝis la kvinan de septembro 1764 en Berlino. Ŝia patro veninta el Portugalio, estis kuracisto kaj estro de la juda malsanulejo. La beleta knabino estis ĉie rimarkita, ne nur pro sia beleco, sed ankaŭ pro siaj talentoj. Ŝi lernis la hebrean, latinan kaj grekan lingvojn, ludis pianon kaj teatron, kaj devis fari paroladon je la alveno de iu eminentulino en Berlino. Do, ne estis miraklo, ke la knabino fariĝis koketa kaj la gepatroj forprenis la spegulon el ŝia ĉambro.

Kiam ŝi iĝis 15-jara Henriette estis, laŭ la kutimoj en judaj familioj de tiu tempo, edzinigita kun 17 jarojn pli aĝa kuracisto Markus Herz. La edzo faras prelegojn pri filozofio en sia loĝejo (universitato ankoraŭ ne ekzistis en Berlino) kaj la juna edzino aŭskultas sian edzon kaj malfermas sian propran salomon en la apuda ĉambro.

La spirita atmosfero ĉe Markus Herz, la

bona edukado en la gepatra domo kaj la kapableco lerni rapide estigas ŝin baldaŭ unu el la plej instruitaj kaj kulturitaj virinoj de Berlino. Ŝi parolas la francan la anglan kaj la italan lingvojn flue kaj konas ĉiujn literaturajn tendencojn de sia jarcento. Inter la aristokratoj, erudiciuloj kaj artistoj, kiuj vizitadas la salomon de Henriette troviĝas baldaŭ junulino, pri kiu ŝi skribas: "Ŝi estas ses jarojn pli juna ol mi kaj multaj el miaj amikinoj, sed la vigleco de ŝia intelekto kaj la varmo de la koro, kune kun la malbonŝanco de ŝia juneco maturigis ŝin frue." Tiu juna virino estis Rahel Levin. Ankaŭ ŝi naskiĝis en bonstata juda familio (la patro estis riĉa juvelisto), sed ŝi ne havis sambonan instruadon, kiel Henriette. La patro mortis frue kaj ŝi vivis kun la patrino per malgranda pensio en iu berlina subtegmentejo. La provo edzinigi ŝin malsukcesis; ŝi estis ne nur malriĉa sed ankaŭ malbela. Ŝi almenaŭ kredis tion kaj suferis pro tio. Iu virino priskribas ŝin tiel: "Rahel estas malgranda, preskaŭ dika, kun talio ne rimarkebla; griza robo ĉirkaŭas ŝin, kiel sako."

Ĉu tio eblas? Ĉu eblas, ke tia "malbelulino" allogis la plej eminentajn virojn en sian subtegmentejon? Mi do rigardis ĉiujn bildojn, kiujn mi trovis en la diversaj libroj. Ne, tiu ĉi virino ne estis malbela. Alia malbena pezis sur Rahel: la fakto ke ŝi estis judino, "la malbenita naskiĝo". Dum ŝia tuta vivo Rahel provas liberigi sin de tiu ĉi "malbena". Ŝi fianciĝis kun la juna markizo de Finckenstein, filo de la prusa ministro kaj ido de la plej altnobela familio de Prusio. La knabo amas ŝin dum kvar jaroj, frekventas ŝian subtegmentejon, sed li ne kuraĝas prezenti la malriĉan Judinon al siaj nobelaj kunuloj. Finfine Rahel rompas la fianĉigon; ŝi mem, preskaŭ rompita, foriras el Berlino, fuĝas al Parizo. Reveninte al Berlino, ŝi ĵetas sin en novan amaventuron kun ambasada konsilisto de Hispanio. Ankaŭ tiu amrilato disiĝas. Rahel postrestas, elĉerpita, elardiĝinta. En 1814, ŝi estas 43 jara; ŝi edziniĝas kun la 14 jarojn pli juna Karl-August Varnhagen von Ense. Ŝi ekhavas sincere ŝin admirantan edzon, korektan sekretarion por ŝia biografio kaj ... ŝi iĝas Antonie Friederike Varnhagen... kristanino! Jarojn poste ŝi perceptas, ke tio estis vana: "Kia historio! Iu rifuĝintino el Egiptio kaj el Palestino mi estas, kaj

trovas helpojn, amon kaj flegon de vi... Tio, kio longe dum mia vivo estis por mi la plej granda hontego, la plej forta aflikto kaj malfeliĉo, ke mi naskiĝis Judino, por neĥia rekompenco mi rezignus tion."

Tiu virino, kiu en sia individua vivo trovis nur modestan feliĉon, ekbrilis ĉe la berlina kulturĉielo, kiel hela stelo. En la komenco, ŝi ne havas instruadon, sed ŝi formas sin mem en la kontakto kun la junaj, futuraj eminentuloj, kiujn ŝi helpas iĝi poetoj, filozofoj, sciencistoj; ŝia salono estas la lulilo de la romantikismo, literaturo-epoko la plej germana! En ŝia salono, sub la tegmento kaj poste en la domo de Varnhagen, kunvenas la fratoj Humboldt, Schlegel, Schleiermacher, Brentano, Chamisso, Fouqué, Heine, Kleist, famaj politikistoj kaj aristokratoj, kiel ekzemple la frato de la reĝo, princo Louis-Ferdinand. La aktorino Karoline Bauer raportas pri la etoso: "En la salono de Rahel mi vidis multajn interesajn kaj famajn homojn... Alexander von Humboldt, granda kaj svelta, eleganta kaj vigla, kiel Franco, subite aperis fulmrapide, ekscitiĝanta kiel vaglumo, mordetis kelkajn rostitajn maronojn aŭ biskvitojn, diris rapide agrablajn kaĵol-aĵojn al Rahel, Henriette aŭ Bettina, disŝprucigis, kiel salona parfumfontano, la plej graciajn kaj pikantajn komplimentojn aŭ novaĵojn, babilis iomete kun s-ro de Varnhagen kaj estis malaperinta, kiel "halucino". La juna Grillparzer, kiu vizitas la salanon de la maljuna Rahel raportas: "Nun la maljunulino, eble neniam beleta, markita de malsano, nun tiu virino, kiu similis al feino, por ne diri al sorĉistino, ekparolis, kaj mi ekestis ravita. Mia laceco foriĝis kaj cedis al iu raviteco. Rahel paroladis ĝis noktomezo, kaj mi ne plu scias, ĉu iu forpelis min, ĉu mi mem decidis foriri. Neniam mi aŭdis paroli tiel sorĉe. En la tuta mondo nur unu virino estus feliĉiginta min, kaj tiu estas Rahel".

Ĉu mi, nejudo, rajtas prijuĝi la konduton de la Judoj de 1800? Ne. Mi nur povas konstati jenajn faktojn: En la 18-a jarcento, epoko de la Klerismo, konataj filozofoj, verkistoj, politikistoj kaj eĉ reĝoj celas liberigi kaj egalrajtigi la Judojn. En Francio Mirabeau skribas: "Vi deziras, ke la Judoj fariĝu pli bonaj homoj kaj utilaj civitanoj! Do, forigu el la sociala vivo ĉiujn humiligantajn kaj degradantajn kondiĉojn; malfermu al la Judoj ĉiujn profesiajn

eblecojn."

En Berlino, la filozofo Moses Mendelssohn tradukis la Pentateŭkon en la germanan lingvon, kaj instigis la Judojn konformiĝi al la lingvo kaj kulturo de sia gastlando. Sed Mendelssohn restis pia Judo; li rifuzis manĝi ĉe sia amiko Lessing ĉar tie la manĝaĵo ne estis ĥosera. La religio estis tio, kio diferencigis judajn kaj aliajn Germanojn. Ĉiuj infanoj de Mendelssohn, same kiel Henriette, Rahel kaj multaj aliaj Judoj strebas akiri la egalrajtecon, konvertiĝante al la kristanismo.

La periodo de la klerisma toleremeco estis mallonga. Jam en 1815 okazis disaj progromoj, kaj en 1881, okaze de la konsekrado de la nova sinagogo en Berlino, la orientalista Paul de Lagarde deklaris: "Ili pretendas je la honora nomo de Germanoj, kaj sian plej sanktan ejon ili konstruas en maŭra stilo, por memorigi, ke ili estas semitoj, azianoj, fremduloj."

LUDWIG HEISE

Rimarkoj— Tuluzo: en la sudokcidento de Francio; en la mezepoka centro de la okcitana trobadorpoezio.

—beletrulo: iu, kiu okupiĝas pri lingvo, gramatiko kaj literaturo.

— vaglumo: moviĝanta fantomlumo kiu delogas dum la nokto la migranton de la bona vojo en la marĉon. La vaglumo estas ŝatata fenomeno en romantikaj poemoj.

—halucino: erara percepto de io, kio ne ekzistas.

marono — : neamara, manĝebla kaŝtano.

ELKORAJN



BONDEZIROJN!

Laborpunito fariĝas poliestro

VIDOCQ

(Fino)

Tie li vivas kelkan tempon sub la aspekto de aŭstra militkaptito. Tiuj soldatoj estis nombraj en Arras, kaj neniu rekonis lin. Post kelkaj semajnoj li konatiĝas kun juna vidvino, kiu vendas merceriaĵojn en malgranda butikoj. Nova transformiĝo. Dum preskaŭ unu jaro li estas honorinda komercisto, bone konata en la najbaraj foirejoj kaj vendo-placoj. Pro ies denuncio, ĝendarmoj venas por lin aresti. Li sukcesas trompi ilin kaj eskapi. Haviginte al si pasporton laŭ la nomo Blondel, li iras en Rouen kun la merceristino. Prospero kaj kvieteco revenas sed estas baldaŭ rompita de Vidocq mem. Pro iu malfidelaĵo li forlasas ŝin. Li estas nun foira kolportisto. En la ĉirkaŭaĵoj de Parizo li akiras sufiĉe gravan klientaron; Li eĉ instalas en Versailles butikon prizorgatan de lia vidvina patrino. S-ro Blondel estas konata komercisto, de ĉiuj estimata. Lia estonto povas esti nur feliĉa.

Ve! fatalo ŝajne lin persekutas. Hazarde, ekskamarado rekonas lin, kaj por venĝi sin pri lama humiliĝo, li denuncas Vidocq. Malgraŭ lia tute regula pasporto la polico certiĝas, ke li ne estas Blondel sed la fuĝinta laborkondamnito Vidocq. Li estas arestita kaj sendata al la malliberejo de Douai. Dumvoje li sukcesas sin kaŝi en veturilo de korpuso iranta al la fama tendaro de Bulonjo, starigita de Napoleono por invadi Anglujojn. Tie, li povis eliri el sia kaŝejo nerimarkite.

Vidocq estas libera. Sendube li povas facile sin kaŝi kaj trovi ian okupon en tiu amaso de ĉiulandaj soldatoj kaj de la multaj komercantoj, kiuj svarmas ĉirkaŭ la tendaro. Sed la afero ne montriĝas tiel facila, kiel li opiniis. Li ne trovas laboron. Senmona, elĉerpita, li malgaje vagas en la tendaro, kiam li renkontas unu el siaj junecaj kamaradoj de Arras. Tiu ĉi fariĝis, laŭ sia diro, rekrutisto por la ŝtata maristaro. Vidocq subskribas dungigon. Kompreneble li alprenis novan identecon. Li baldaŭ ekscias, ke li ne fariĝis ŝtata maristo sed korsaro. La kapitano de la ŝipo estas unu el tiuj maristoj, kiuj ricevis de la registaro

"markleterojn" rajtigantajn ilin kapti la komercajn ŝipojn de la malamiko. La nova ŝipano partoprenas kelkajn atakojn kontraŭ anglaj ŝipoj. La metio estas profiĝa, ĉar li ricevas sian parton de la kaptaĵoj. Ĝi estas ankaŭ danĝera; sed tio ne tro gravas por liaj aventuroj kaj kuraĝo. Sed la disciplino estas tro strikta por lia individuo, kaj li sopiras al pli libera vivo. Favora okazo sin prezentis. Dum ataka alboriĝo unu el liaj kamaradoj, tre similanta al li, estis mortigita. Li prenas la paperojn de la mortinto kaj, dum halto en la haveno, li dizertas.

Li estas facile dungita en la marartilerio. Pro siaj spertoj kaj bona konduto li estas rapide promociita. La kaporalo Lebel povas esperi honorindan karieron. Vana espero! Iu krimulo, kiun li konis en malliberejo denuncas lin. Nova aresto kaj enkarcerigo en la jam konata malliberejo de Douai. Tie okazas evento, kiu tre ĝojigas lin. Lia edzino decidis laŭleĝigi siajn rilatojn kun sia nuna amanto. Ŝi petis eksedziniĝon; sed por ties validigo, ŝi devas oficiale informigi sian tiaman edzon. Vidocq atendas la juĝon, kiu nepre sendigos lin denove en la punlaborejojn. Post kvin monatoj li sukcesas forkuri el la malliberejo, aŭdace plonĝante en la riveron Scarpe, kiu fluas ĉe la piedo de la konstruaĵo. Alvestita en oficira uniformo li atingas Parizon.

En tiu urbo li trovas rifuĝon ĉe juvelisto de li konata. En najbara ĉambro loĝas juna virino, Annette (Anet). Amo rapide naskiĝas inter ili. Annette poste fariĝas por li fidela kaj valora helpanto. Dum kelka tempo Vidocq denove estas foira kolportisto. Poste li aĉetas malgrandan butikon de tajloro. Lia negoco prosperas kaj havigas al li sufiĉe gravan enspezon. La nova komercisto akiris reputacion de honesta kaj fidinda homo. Tiu feliĉa periodo ne daŭris eĉ tutan jaron. Iun tagon du viroj vizitas la tajloron. Ili estas fuĝintoj el la punlaborejo de Brest. Ili postulas monon de sia ekskunulo. Por eviti denuncon Vidocq devas obei. Sed la du banditoj fariĝas pli postulemaj kaj eĉ provas kompromiti lin. La ĉantaĝo fariĝas neelportebla kaj ne sendanĝera. Nepre li estos denunciata aŭ entirita en malbonan aferon. Malesperiga situacio! La bildo de la punlaborejo aperas antaŭ la okuloj de Vidocq. Longe pripensinte li trovas nur du eblajn solvojn: fuĝi en alian urbon aŭ

dungiĝi en la polico. La unua solvo tute ne estas sekura; ĉiam li povos esti rekonita de liberigita aŭ fuĝinta krimulo; sekvos neevitebla aresto kaj resendo al la punlabor-ejo La dua solvo, kvankam eble malfacila, ebligas indan vivon kaj signifos reintegrigo en la societron. Li decidis pri la dua solvo kaj klopodas por viziti la polican prefektron, s-ro Henry. Li konfesas al li sian situacion kaj promesas rivelon pri serĉataj fuĝintaj kondamnitaj. Tiu provo malsukcesas. Jen okazas, tio, kion li timis. Ne povante kontentigi la postulojn de la du ĉantaĝistoj, li estas denunciata, luan matenon, je sunleviĝo, frapado ĉe la magazena pordo vekas la "honorindan tajloron". Policistoj venas por lin aresti. Helpata de Annette li sukcesas sin kaŝi inter du matracoj en ĉambro sur la kvara etaĝo. Ne trovita de la policistoj li rifuĝas ĉe feltanisto. Parizo ne plu estas sekura por li. Li devas forkuri. Li do havigas al si falsan pasporton, sed ne havas tempon ĝin uzi. Li estas arestita post drameca persekuto sur la tegmentoj. Oni kondukas lin al Bicêtre, kie li atendas la proksiman "ĉenon" al Toulon.

Vidocq penas reagi kontraŭ la malbona sorto. Li skribas al s-ro Henry kaj denove proponas siajn servojn al la polico. Kiel rekompenco li petas nur la favoron ne esti sendita al la punlaborejo. Intertempe, s-ro Henry studis lian dosieron. Li tiel ekscias, ke Vidocq estis enkarcerigita nur pro militistaj deliktoj: sendisciplino, malobeo, dizerto. Malgravaĵoj laŭ la tiama kriminala vidpunkto. La akuzo pro "falsado de publikaj dokumentoj" pro kiu li estis kondamnita je ok jaroj da punlaboro forfalas ĉar la akuzintoj, arestitaj pro siaj krimoj, konfesis sian mensogon. Ankaŭ la akuzo pri murdo estis pruvita erara. Li ja plurfoje sukcesis aŭdacajn forfuĝojn. Sed neniel li povas esti konsiderata ŝtelisto aŭ krimulo. Cetere la informoj, kiujn li donis estis tiel precizaj kaj valoraj, ke la prefekto decidis lin liberigi kaj dungi lin en la polico.

Ek de la jaro 1809 Vidocq estas "sekreta agente" de la ŝtata polico kaj povas repreni sian patran nomon. Por ke la aliaj krimuloj ne povu suspekti tion, oni aranĝis ŝajnan forfuĝon. Ĝi okazis dum transigo al alia malliberejo. Kompreneble ĝi plene sukcesis; ĉiuj traserĉoj por lin retrovi estis vanaj. Tiu aŭdaca "fuĝo" plifortigis la admiron de la pariza krimularo kaj ties

konfidon al li, konfido kiu estis lerte utiligata de la nova policisto. La sekreta agente rapide montras sian kapablecon, arestas aŭ arestigas famajn banditojn de longe serĉatajn. Kuraĝa, sentima, aŭdaca, havante sperton de tiu danĝera kaj stranga medio de ŝtelistoj, murdistoj kaj diboĉuloj, posedanta eksterordinaran talenton por ŝanĝi sian aspekton, li povis penetri ĉien kaj kapti la konfidon de siaj estontaj viktimoj. Annette, je kiu li edziĝis estanta malliberulo, estis valora helpanto al li. Ankaŭ ŝi scipovis tre lerte alivestiĝi, kaj kelkaj gravaj el liaj kaptaj estis ebligataj de ŝi. Kiel ĉiam la sukceso naskis ĵaluzojn. Li devis sin gardi kontraŭ la perfidoj kaj kaptitoj de siaj kolegoj sekretaj agenteoj, ankaŭ ekskondamnitaj, ne tre ĝenataj de skrupuloj. Li sukcesis eskapi tiun "internan danĝeron", kiel li diris.

Pro siaj kapablo kaj lojaleco al siaj superuloj, li estis "leĝe pardonita" en la jaro 1818. Fine li estis promociita al la oficiala regula polico. En 1832 li ricevis la altan postenon de estro de la "sekuriga polico". Rapide liaj funkcioj transpasis la nuran protektadon de la havaĵoj kaj vivo de la Parizanoj. Oni konfidis lin pri pli delikataj kaj sekretaj misioj. Li ĉiam energie neis, ke li okupiĝis pri politika polico. Tio estas vera koncerne la internan politikan policon, kiu zorgas pri la partioj kaj la kontraŭantoj de la registaro. Sed tio estas malvera koncerne la internaciajn rilatojn. Sendube li estis tre agema kaj efika agente de la registaroj, kiujn li servis. Li reorganizis kaj perfektigis tiun "sekretan informadon" nun konatan de la publiko laŭ la nomo "kontraŭ spionado". Li havis korespondantojn en ĉiuj grandaj urboj francaj kaj eŭropaj, kaj amasigis gravan dokumentaron.

Vidocq estis fariĝinta grava persono, posedanta ŝtatajn sekretojn, tre bone informita pri la financistoj, industriistoj, politikistoj, kiuj estis fakte la kaŝataj sed efektivaj regantoj. Vidocq havis realan potencon. Sed tiu potenco mem estis danĝera. Oni timis, ke lia ambicio instigos lin uzi siajn sekretajn informojn por persona profito kaj superregado. Tial oni uzis pretekston de iu malbone sukcesinta polica afero por devigi lin retiriĝi de la polico. Li proklamis, ke li memvole forlasis sian postenon. La vero estas, ke tiu "emer-

itiĝo", laŭ lia propra esprimo, estis altrudita Ĝi okazis en 1833, post dekkvin jaroj da polica estrado.

Vidocq estis tiam 58-jara, sana, fortika kaj tute ne emis al senlabora ripozo. Tial, li fondis en Parizo, strato Vivienne, oficejon de privata polico. Tiel li kreis novan socian funkcion, kiu multe disvolv-igis. En nia epoko ĝiaj anoj titoligas sin "privataj detektivoj". Liaj prospektoj kaj oficialaj paperoj estis titolitaj "Vidocq, diplomito de la Reĝo". Li povis havigi "ĉiujn diversajn informojn". Oni povis eĉ aboni liajn servojn. Li promesis al siaj abonantoj "protekon kontraŭ ĉia komerca friponaĵo, kontraŭ ŝteloj aŭ ties efektoj", kaj eĉ "kontentigon de plej grandaj postuloj". Oni legis ankaŭ sur liaj aferleteroĵoj tiun aserton: "Mi timas en mia kariero nek konkurencon, nek rivalecon; ĉiuj, kiuj provis min imiti malsukcesis". Informpeta letero al iu urbestro finiĝas per la jenaj vortoj: "Se, sekve de mia antaŭa ofico kaj pro la vasteco de miaj nunaj interrilatoj, mi povas utili al vi por io ajn, vi povas disponi pri mi kaj kalkuli pri mia diligenta kontentigi vin". Kiam li eksciis, Vidocq konservis por si la ĉefajn dokumentojn. Aresto, polica traserĉado ne ebligis trovi ilin. Li ja havis potencon memorkapablon, sed kredeble estas, ke li tiam kaŝis siajn dosierojn, kaj eble poste, detruis ilin. Neniam ili estis retrovitaj. Ŝajnas, ke ekzistis speco de neskribita kontrakto inter Vidocq kaj la tiamaj potenculoj. Silento de ambaŭ flankoj estis garantio de sekureco por ĉiuj. Oni nenion scias pri la lastaj tagoj de Vidocq. Li mortis en 1858, estante 83-jara, ŝajne tute forgesita.

Juĝi tian homon estas tute neeble. Lia tuta vivado estas kaŝita malantaŭ la sennombraj maskoj, kiujn li alprenis. Kvankam oni ne povas akuzi lin pri krimoj, tre evidente li ne estis tre skrupulema. Li certe estis tre ambicia. En diversaj okazoj, ankaŭ en sia ofico de poliestro li montris veran lojalecon. Tamen oni devas agnoski, ke lia tuta agado, kiel policisto, estis bazita sur trompo, perfido, denuncio kaj aĉeto de konsciencoj. Cetere tre inteligenta, li tute reorganizis la policon; kaj la franca "Sur-eté", t.e. "sekuriga polico" fariĝis modelo por la aliaj eŭropaj ŝtatoj. Li konfesis revoluciemajn ideojn laŭ tiu epoko, kiu estas ja unu el la plej konfuzaj kaj eble, el

la plej koruptitaj de nia historio.

Li pretendis, ke la rolo de polico ne estas simple aresti kaj punigi krimulojn, sed ke ĝia vera funkcio devus esti prevento de la krimoj kaj certigo de la sekureco de la civitanoj. Li ankaŭ batalis por pli humana traktado de la arestitoj kaj kondamnitaj. Li asertis, ke multaj estas viktimoj de maljusta sociordo, kaj estas rebonigeblaj. Se tiam liaj sugestoj estis malakceptitaj, ni povas konstati, ke liaj teorioj estas la bazo de la nunaj tendencoj de la kriminala justico.

PAUL BERTHELOT

(sekvo de paĝo 4)

membroj. Sekve ne eblas ĝin aboni."

Ĝaldaŭ okazos la plej grava Esperanto-evento de tiu epoko, kaj, laŭ mi, de la tuta Historio de la Esperanto-movado: la unua UK de Esperanto en Boulogne-sur-Mer. Unuafoje pli ol 600 esperantistoj el 20 naciecoj renkontiĝas. Zamenhof faris la vojaĝon. Delegito de "l'Aplech Esperantista de Catalunya", R. Subirà, portis "baratina". P.B. ne ĉeestis. La demandon tuj sekvas nepriskribebla entuziasmo. Juna partoprenanto eĉ parolis pri "Pentekosta Miraklo". La kongreso fundamentis la Esperanto-movadon: fondo de la Esperantista Centra Oficejo (ECO) kaj de la Lingva Komitato. La unua publikaĵo de l'Eco estas 32-paĝa broŝuro raportanta pri la Bulonja kongreso, ĉefe pri ties dua ĝenerala kunveno.

Por pli bone ekkoni P.B., natura filo de Paul Bert, necesas relegi la artikolon de la dominikana pastro Audrin, en n° 137 de 1985 de la revuo "Conflent": "Membro de la hispana anarkiistaro, entuziasma disĉiplo de Ferrer, P.B. eble partoprenis la kriman atenton kontraŭ la junan hispanan reĝon Alfonso la XIII-a". Evidente, necesus diri "kataluna" anarkiistaro. La 25-an de novembro 1905, la presejoj favoraj al la kataluna esprimiĝo estis prirabitaj. Komence de 1906, P.B. instaliĝis en Svislando, kie li partoprenis la fondon de "Internacia Socia Revuo". Poste li vagis tra suda Ameriko. Li mortis apenaŭ 29-jara en franca dominikana misio en la amazonia arbaro.

(Laŭ artikolo de J. Amouroux, aperinta en "Conflent", n° 202 - Julio-aŭgusto 1996.

esperantigis J. Vincent

La lasta printempo de Saadi

Avetik Issakian

Venis la printempo. Unu el tiuj printempoj, kiuj pibeligas la teron. Saadi, la poeto de la ĝojo, kaj de la tristo, vivis cent similajn printempojn. Saadi vekigis frumatene. Li eliris al sia floranta ĝardeno kuŝanta sur la bordo de la rivero Ronabadi. Ankoraŭ unufoje li volis aŭskulti la kanton de la najtingalo kaj vidi la miraklojn de la printempo.

Li turnis la okulojn al la vastaj kampoj de Siraz, apenaŭ vekigitaj el la matena dormetado, sur kiuj belaj rozoj ekburĝonis. Blanka, parfuma nebulo ilin kovris. Saadi sidiĝis sur disrilitan tapiŝon el Ispahan, sub arbedo de florantaj jasmenoj, per siaj tremantaj fingroj retenis kaptitan rozburĝonon, verdan kaj ruĝan, apenaŭ malfermiĝintan, kaj li murmuris mallaŭte: "Kiel juna virgulino ridetas al sia amato, sidante ĉe liaj piedoj, tiel same malfermas la rozo siajn lipojn al la matena vento!

Kvankam Saadi estis ŝargita per jaroj, lia animo kontinuus percepti per la okuloj kaj oreloj duone ekdormintaj la mirindajn fenomenojn kaj pentraĵojn de la naturo, la kantojn kaj la forajn mutajn spacojn; li daŭre babilis kun la sorĉanta ĝenio de la poezio, la birdo Zmracht, kies nesto lokiĝas sur la supro de la monto Kaf, en la regno de la steloj.

La najtingaloj, kun klaraj okuloj kaj griza plumaro, pepadis en mirindaj triloj; brulante de la fajro de la amo, ili kantis en la koro de Saadi. La virga spiro de la dolĉa zefiro murmuris al la rozoj la mesaĝojn, kiujn ĝi al ili alportis de foraj enamiĝintaj rozoj kaj la animo de Saadi, deĉifris tiujn ĉi ampromesojn. "Amanta koro komprenas ĉiam la lingvon de la naturo. La universo vivas en pasia kaj eterna ebrigo" diris al si Saadi ripetanta siajn proprajn parolojn iamajn. El sia tuta animo li aŭskultis la kanton de la najtingalo kaj paŝtis siajn okulojn per la beleco de la purpuraj rozoj. Saadi enspiris avide ilian sorĉan parfumon; ebrigitante, li fermis la okulojn kaj li vidis en sia animo la universon kvazaŭ en go. Li vidis la

ebenajojn de Turano tremigatajn de la tempestoj kaj de la timigaj, misvolaj ĝenioj, kiuj ŝvebis en la aero sur la flugiloj de la tempesto, svingante fajroglavojn. Li vidis la silentajn akvojn de la rivero Indus ombrumatajn per sanktaj lotusoj. En la ĝangaloj li vidis la saĝajn kaj songantajn elefantojn. Li vidis en la oritaj palacoj de Delhi la belajn virgulinajn kun purpuraj floroj pikitaj inter iliaj haroj, kiuj nigris kiel la nokto. Li vidis ankaŭ la dezerton, bruligitan de la suno, la surĉevalajn beduenojn, kiuj persekutas la rapidajn ĉamojn sub la okuloj de la agloj ŝvebantaj en la aero.

Kaj li vidis senfinajn karavanojn de pilgrimantoj; li vidis ilin surgenuiĝintaj, preĝantaj kaj kantantaj antaŭ la pordegoj de Mekka. Kaj li vidis la miraklojn de Egiptio glorajn pro antikveco, kaj la lazuran kristalon de la senfinaj maroj, kaj la dolĉajn virgulinajn de Damas, kun lunkolora korpo, kun ravaj kaj fleksiĝemaj brakoj kolieroj ĉirkaŭantaj la kolon de la juna Saadi.

Saadi malfermis siajn okulojn kaj eksuspiris: "Ve, miaj cent jaroj fuĝis, kiel dolĉa revo, kiel la sonĝo de unu nokto, kaj la jaroj pasis nerimarkate, ĉar vi, rakontoj, vi najtingaloj, vi rozoj kaj vi, junaj voluptemaj knabinoj, fratinoj de la rozoj, ĉiam gardis al mi vian kuneston."

La radioj de la suno traboris la aerĝardenojn, ore brilantajn per floroj; la herbo kaj la rokoj fajferis per mil fajroj, ĉar la nokto superverŝis ilin per polvo diamanta. Saadi rigardis ĉirkaŭ si per siaj profundaj kaj penetrantaj okuloj, kontemplan la lazuran ĉielon, la birdojn flugantajn en la spaco, kiun oris la aŭrore. Liaj okuloj restis konsternitaj kaj mirigitaj:

"Jes la universo estas miraklo, konsterna senfine bela rakonto. Mi kontemplas la universon ĉiutage, kaj ĉiutage mi estas mirigita, kvazaŭ la unuan fojon mi vidus ĝin; universo familieca, kvankam mirinda; universo antikva kaj ĉiam nova, nova per ĉarmo eterna kaj neesprimebla, kaj kiu estas komparebla nur kun si mem."

Saadi rigardis ankoraŭ unufoje la universon, la ludon de la variaj kaj magiaj koloroj de la naturo; subite li rimarkis du turtojn kun koralruĝaj ungoj, kiuj saltadis en la vasta kampo kaj kiuj interkaresadis volupteme; tiam Saadi diris al si ankoraŭ unufoje; "La universo estas sorĉita, ĉio en ĝi estas sorĉita per la magia ringo de nevidebla feino kaj estas transformita en fe-rakonton. La universo pasas impete, diseriĝas kaj transformiĝas, sed kio kons-truas tiun ĉi pompan mondon kaj kio rulas antaŭ nia animo tiun ĉi mirindan rakonton? Kio puŝas la ĉamon de koro tremanta pro la soifo de la amo, ke ĝi surgrimpu la pintajn rokojn por tie rompi siajn kornojn? Kio malfermas al la rozo ĝian smeraldan korseton kaj igas ĝin disvastigi sian delik-atan parfumon? Kio devigas la homon aperi el la nekonato, survesti karnon kaj sangon, por ke li pensu kaj suferu, por ke li sentu la flamojn de l'deziroj, kiuj nin bruligas kaj por ke li neniam volu morti? Ho amo, dum estas vi, vi, nevidebla potenco, vi, ravanta tirano, mi konas vin de antaŭ longe! Kaj tamen neniam mi povis kompreni vian profundon kaj vian esencon."

Kaj per sia akrevida animo Saadi komprenis, ke li vivas sian lastan prin-tempon. La lasta printempo!

Liverante sian korpon, blankan kiel nebulo, al la karesoj de la venteto, aperis Naziat, la amatino de Saadi, juna knabino de Siraz. Ŝi ofte vizitis la poeton. Ŝiaj lipoj, ebrigiĝaj kiel la vino, la blanko kaj varmo de ŝiaj nudaj brakoj plurajn fojojn ĉarmis la maldormojn de la centjara poeto. Saadi ŝin amis el sia tuta juneca kaj vivama koro; li ŝin eternigis per oraj literoj en sia senmorta "Gulistan".

Naziat, portante plenbrakon da rozoj, proksimiĝis al Saadi, ankaŭ ŝi mem dis-vastigis rozparfumon. Ŝi salutis la poeton. Saadi estis malgaja. Melankolio pentriĝis sur liaj palaj lipoj.

"Kial tiu ĉi malĝojo, ho vi, plej feliĉa el la mortuloj?"

Saadi gardis la silenton.

"Mi amas vian melankolion, ho Saadi; ĝi estas plena de saĝo; vi diris per viaj diaj lipoj, ke la perloj naskiĝas el la pluvoj, kaj ke, brulante, la incenso disvastigas sian

delikatan parfumon."

Saadi-rigardadis la knabinon kun pala rideto.

"Rigardu! mi portis al vi rozojn, velurajn rozojn de mia ĝardeno!"

Kaj per la pintoj de siaj fingroj ŝi surŝutis la poeton per rozoj; poste ŝi karesis la melankolian frunton de Saadi.

"La rozoj, kiujn vi donacis al mi, ho virgulino de l'paradizo, ĉiam estis la plej belaj en la universo kaj ili velkos neniam.

"Ho Saadi! Enspirante la parfumon de rozo, kial pensi pri ĝia ekzisto efemera? Rememoru ĝian parfumon kaj vi pli facile forgesos, ke ĝi estas jam long-tempe velkinta," diris Naziat ripetante per arĝenta voĉo la malnovajn vortojn de la poeto. Kaj ŝia hararo, kiu invitis al dolĉa dormetado, kovris la vizaĝon de Saadi en la momento, kiam ŝi surgenuiĝis antaŭ la poeto; venteto leviĝis en la ĝardeno skuante la flugilojn milkolorajn. Parfumita venteto; ĝin estigis la mirindaj flugiloj de Zmrocht, kiuj ekmoviĝis, kiam Saadi per tremanta mano karesis la lulantajn harojn de Naziat.

Poste Saadi, el la fundo de sia animo, ĵetis rigardon sur la mondon sorĉan, kiu ekbrulis ĉirkaŭ li; poste li reportis siajn okulojn sur la lumantan rideton de la mirinda virgulino; kaj brulanta larmo cindrigis lian maljunan koron; tiam, prenante la etan manon de la eta knabino li kisis ĝin kaj premis ĝin sur sian frapegantan koron.

"Surskribu per viaj malgrandaj fingroj miajn lastajn vortojn sur la lastan paĝon de mia "Gulistan".

"Ni naskiĝas sen nia volo, ni vivas en la konsterno, ni mortas en la malĝojo!"

El la armena: L. SKIT

DIABLO TROMPITA DE VIRINO

(Dum sia marvojaĝo al la Orakolo de la dia Botelo, Pantagruel haltas en la insulo de la Papfigoj.)

"Por preni benitan akvon, kaj al Dio nin rekomendi, ni eniris en kapeleton apud la haveno.

Enirintaj en la kapelon kaj prenantaj benitan akvon, ni ekvidis en la sanktakvujo viron vestitan per stoloj kaj interne de l'akvo kaŝitan, kiel anaso plonganta, escepte iom el la nazo por spiri. Ĉirkaŭ li estis tri pastroj bone razitaj kaj tonsuritaj, legantaj la preĝlibron kaj ekzorcantaj la diablojn. Pantagruel trovis la aferon stranga kaj, demandinte kian ludon ili tie ludis, informiĝis, ke, antaŭ tri jaroj, regis en la insulo pesto tiom horora, ke duono kaj pli de la lando dezertiĝis, kaj la bienoj fariĝis sen posedantoj. Post finiĝo de la pesto ĉi tiu viro sin kaŝanta en la sanktakvujo plugas kampon grandan kaj fruktodonan, kaj ĝin prisemis per greno, je la samaj tagoj kaj horo, kiam diableto (kiu ankoraŭ ne sciopovis tondri kaj hajli, escepte nur sur petroselon kaj brasikojn, ankaŭ ne scipovis legi nek skribi) estis permesita de Lucifero veni en tiun insulon de la Papfigoj por sin distri kaj petoli; ĉar tie la diabloj havis grandan familiarecon kun la viroj kaj virinoj, kaj ofte tie pasigis tempon.

Tiu diablo alveninta en tiu loko, sin turnis al la plugisto, kaj demandis al li, kion li faras. La povrulo respondis al li, ke li prisemas tiun kampon por sin helpi al vivado sekvontan jaron. "Sed," diris la diablo, "tiu kampo ne estas cia; ĝi estas mia kaj al mi apartenas. Tamen semi grenon ne estas mia profesio. Tial mi lasas la kampon al ci sed kondiĉe, ke ni partigos la profiton" - "Mi konsentas," diris la plugisto. "Mi volas," diris la diablo, "ke el la profito venonta ni faru du partojn. Unu estos, kio kreskos sur la tero; la alia, tio kio estos en la tero kaŝita. La elekton mi rajtas ĉar mi estas diablo devenanta de

nobla kaj antikva raso; ci estas nur malnobelo. Mi elektas tion, kio estos en la tero; ci havos la supraĵon. En kiu tempo estos la rikolto?" - "Je mezo de julio," respondis la plugisto. "Nu, diris la diablo, mi ne mankos ĉeesti. Nur faru laŭ via devo: laboru, malnobelo, laboru!"

La duono de julio alveninte, la diablo denove sin prezentis sur la loko akompanata de skadro de dialetoj-akolitoj. Tie, renkontinte la plugiston, li diris: "Nu, malnobelo, kiel ci fartis depost mia foriro? Tie ĉi konvenas fari nian partigon." - "Tio estas justa," respondis la plugisto. Tiam li kaj liaj helpantoj eksegis la grenon. La dialetoj, same, eliris la stoplojn el la tero. La plugisto draŝis sian grenon sur la draŝejo, ĝin ventumis, ensakigis, portis al la vendoplaco por ĝin vendi. La dialetoj faris same, kaj sur la vendejo, apud la plugisto, ili eksidis por vendi siajn stoplojn. La plugisto tre bone vendis sian grenon kaj per la mono plenigis malnovan duonboton, kiun li portis ĉe la zono. La diabloj vendis nenion; eĉ male, la kamparanoj, meze de la vendejo, primokis ilin.

Kiam estis finita la vendado la diablo diris al la plugisto: "Malnobelo, ĉi-foje ĉi trompis min, sed venontan fojon, ĉi ne trompos min." - "Via diabla moŝto," respondis la plugisto, "kiel mi estus trompinta vin ĉar vi elektis unue? Vere estas, ke per tiu elekto vi opiniis trompi min esperante, ke nenio el tero eliĝos por mia parto, kaj ke malsupre vi trovos la tutan grenon, kiun mi semis kaj per ĝi tentos la homojn suferantajn, bigotajn aŭ avarajn, kaj per tento ilin faligos en viajn retojn. Sed vi estas tre malsperta en via metio. La greno, kiu estis en la tero mortis kaj putris; ties putro naskis la alian grenon, kiun vi vidis, ke mi vendis. Tiel vi elektis la plej malbonan. Pro tio, vi estas malbenita en la Evangelio." - "Ni forlasu tiun paroladon," diris la diablo. "Per kio, ci povos ĉi jaron sekvontan prisemi nian kampon?" - "Por profito," respondis la plugisto, "laŭ bona mastrumado, konvenus ĝin prisemi per rapoj" - "Nu, diris la diablo, ci estas bona malnobelo; semu multe da rapoj. Mi ilin ŝirmos de ventego, kaj ne hajlos sur ilin.

Sed bone komprenu: mi postulas por mia parto tion, kio estos sur la tero, kaj ĉi havos la malsupraĵon. Laboru, malnobelo, laboru."

Alveninta tempo de rikolto, la diablo estis sur la loko kun skadrone de domdiabletejo. Tie, renkontinte la plugiston kaj ties helpantojn, ili eksegis kaj rikoltis la rapfoliojn. Post ili, la plugisto fosis kaj eltiris la dikajn rapojn kaj ilin metis en sakojn. Tiel ĉiuj iris kune al la vendejo. La plugisto tre bone vendis siajn rapojn. La diablo vendis nenion. Eĉ pli malbone, oni lin publike primokis. "Mi ja vidas," diris do la diablo, "ke mi estas trompita de ĉi. Mi volas fini la aferon pri la kampo inter ĉi kaj mi. Tio estos la pakto, ke ni intergratos unu la alian kaj, kiu el ni unue kapitulacos, tiu forlasos sian parton de la kampo. Ĝi tute restos al la venkinto. La tago estos post semajno. Iru, malnobelo, mi ĉin diable gratos."

La plugisto reirante en sian domon, estis malgaja kaj pensema. Lia edzino vidante lin tia kredis, ke li estis priŝtelita sur la vendejo. Sed aŭdante la kaŭzon de lia melankolio, ankaŭ vidante lian monujon plenan de mono, doĉe lin konsolis, kaj certigis lin, ke, pro tiu gratado, malbono neniam lin atingos. Li nur fidu kaj konfidu al ŝi. Ŝi jam estis pripensinta bonan rimedon. "Plej malbone", diris la plugisto, "mi ricevos nur gratstrekon; mi kapitulacos je la unua grato kaj forlasos la kampon al li." - "Neniel, neniel", diris la maljunulino, "fidu kaj konfidu al mi; lasu min agi. Vi diris al mi, ke li estas diabletejo; mi lin tuj kapitulacigos, kaj la kampo al ni restos. Se li estus granda diablo, estus dubeble."

Kiam ni alvenis en la insulon, estis la asignita tago. Frue en la mateno, la plugisto tre bone konfesdonis, komuniigis kiel bona katoliko; kaj laŭ konsilo de la paroĥestro, plonĝe sin kasis en la sanktakvujo, tiel, kiel ni lin trovis.

Dum oni rakontis al ni tiun historion, ni estis informitaj, ke la maljunulino trompis la diablon kaj gajnis la kampon jene: la diablo venis al la pordo de la plugisto kaj sonorigante ekkriis: "Ho! malnobelo, malnobelo, jen jen, per belaj ungegoj!" Kaj enirinte en la domon, fieraj kaj tre memfida, ne trovinte la plugiston,

ekvidis lian edzinon plorantan kaj lamentantan. "Kio estas?" demandis la diablo. "Kie li estas? Kion li faras?" - "Ho!", diris la maljunulino, "Kie li estas, la malbonulo la turmentisto, la rabisto? Li min frenezigis, mi estas forperdita, mi mortas pro la vundo, kiun li faris al mi!" - "Kiel?", diris la diablo, "kio estas? Mi lin tuj bategos" - "Ha", diris la maljunulino, "li diris al mi, la turmentisto, la tirano, la gratisto de diabloj, ke hodiaŭ li estas asignita por intergrati kun vi. Por provi siajn ungegojn, li gratis min nur per la fingreto, tie inter la du krukoj, kaj min tute vundegis. Mi estas perdita; neniam mi resaniĝos; rigardu. Plie li iris al la forĝisto por akrigi kaj pintigi siajn ungegojn. Vi estas perdita, sinjoro Diablo, amiko mia. Forkuru, li ne haltos. Foriru, mi vin petas!"

Tiam ŝi malkovris sin ĝis la mentono, laŭ la maniero per kiu la Persaj virinoj sin montris al siaj filoj fuĝantaj la batalon. La diablo vidante la grandegan "vundon" ekkriis: "Mahom! Meĝera! Alekto! Persefona! li min ne tenas! Mi foriras plej rapide! Nu, mi forlasas la kampon al li!"

El malnova franca lingvo tradukis

E. MOTILLON



SOLVO DE LA LITERA ENIGMO

La trovataj ŝlosilvortoj estas:


Jugoslavio - Nikotino - Sarkofago -
 Januaro - Vendredo - Edeŭejo - Krist-
 nasko - Japanujo - Mediteraneo - Ripeti -
 Sceptro - Privilegio - Tulipo - Teretaĝo.

Trovata aserto de d'Alembert:

Germanujo estas kreita por vojaĝi tie;
 Italujo por restadi tie; Anglujo por pensadi
 tie; Francujo por vivi tie.

POR VIA DISTRO.

KRUCVORTA ENIGMO



HORIZONTALE: 1. Batlaborilo. - 4. Manĝdeziranta. - 7. Manĝata molusko. - 8. Bongusta riverfiŝo. - 9. Respektigi, kiel dion. - 10. Longkrura marĉa birdo. - 15. Ame okulsigni. - 16. Malokcidenta. - 17. Homarplimultiganta birdo. - 19. Fari gazeton. - 22. Ĵetludilo. - 24. Lerneja skribilo. - 25. Vivĉesi. - 26. Turne movadi fluidaĵon. - 27. Pago al la ŝtato. - 28. Granda regno.

VERTIKALE: 1. Supervesto - 2. Ronda kuko. - 3. Atente rigardadi. - 4. Blubera kreskaĵo. - 5. Ne povanta aŭdi. - 6. Malnovtempa. - 11. Paneto - 12. Fermita mano. - 13. Flugbesto. - 14. Senkompara. - 17. Rondire moviĝi. - 18. Armea ranghavanto. - 19. Kolekti la fruktojn. - 20. Butontrua rekonilo. - 21. Plej malgranda materiero. - 23. Maltage.

LA VIVO EN GRESILLON

Ĝenerala kunveno en Greziljono

(31an de oktobro 1998)

Tiun kunvenon estris la prezidanto Dominique Babin, kiu post saluto al la partoprenantoj sciigis, ke 229 personoj ĉeestas la kunvenon aŭ estas reprezentataj.

Post repago de kelkaj akcioj pro morto de la posedantoj, la societa kapitalo sumas 208600 F. kaj la membraro nombras 876.

Ĉijare la nombro de la adoltaj staĝanoj malkreskis kaj la nombro de la infanaj staĝanoj kreskis. La donacoj por subteno de la Infan-renkonto progresis. Koncerne la kontoj de la jaro 1997 la ĉapitro "Restado" favoras je 10 507 F., malpli ol en la jaro 1996; la ĉapitro "Memoraĵoj-librovendado" favoras je 7 834 F., pli ol en la jaro 1996.

La finkalkulo por la jaro 1997 montras deficiton de 20 619 F. Tamen estas necese klarigi, ke tiu manko parte rilatas al provizado por strukturoj farita dum la jaro 1997. La financa raporto estas unuanime akceptita.

La diversaj renkontoj estis bonetosaj, interesaj kaj kontentigis ĉiujn dank'al la laboro de kelkaj gesamideanoj. La nombro da ĉeestantoj ne estis regula dum julio sed iom pli vigla ol kutime en aŭgusto. Tamen la nombro da partoprenantoj ne entute sufiĉis por ke la somera periodo estu ekonomie kontentiga.

Bedaŭrinde, ne la staĝoj signis tiun jaron, sed la vizito de la Komisiono pri sekureco. Tiu komisiono volis, tri tagojn post la malfermo de la kastelo, fermi ĝin. Sed ĉar la aliĝintoj jam ĉeestis, la someraj aktivaĵoj daŭris. En septembro estis petata viziton de specialista entrepreno, kiu detale analizis multajn mankojn rilate sekurecon kaj normigon. La normigo postulis tiom da prilaboroj, ke la necesaj elspezoj grandegde superis niajn financajn eblecojn. Alia komisiono kunvenis en septembro. Ni parolis pli pri sekureco ol pri normigo malfacile aplikebla en tiel malnova konstruaĵo. En oktobro la Komitato decidis refari la tutan elektran cirkviton kaj instalii sistemon de fum-detektado. La laboroj, kiuj elĉerpis la kason (400 000 F.), estis faritaj meze de junio 1998. (Ĉiuj scias, ke en 1998 la problemo graviĝis.). La komitato decidis peti financon helpon de la esperantistaro kaj speciala Fonduso Sekureco estis kreita. Jam en 1997 venis mondonacoj. La komitato dankas ĉiujn donacintojn.

Sed tiu afero aperigis nefirmecon de la Esperantista Kulturdomo. Unue, fronte al la legaj tekstoj kaj interpretado de la Administracio. Tiuj tekstoj pli kaj pli limigas nian sendependecon. Aliaj francaj asocioj konas similajn malfacilaĵojn. Poste, fronte al la financaj problemoj. De post pli ol dek jaroj, ni rezervis monon por riparigi la murojn kaj modernigi la ĉambrojn. Tiu mona rezervaĵo jam elĉerpiĝis kvankam nur malgranda parto de la necesaj laboroj estis faritaj., kaj jam oni petas de ni pagon de la ĉiujara kontrolo de la novaj instalaĵoj. Ĉiuj prilaboroj estas aferoj de specialistoj, kiuj respondecas antaŭ la asekurkompanioj. Finiĝis la tempo, kiam la esperantistoj aranĝis la kastelon per sia propra ŝvito! Fine, fronte al la administrado mem de la staĝoj, la demando "Ĉu la Esperantista Kulturdomo sammaniere daŭrigas siajn aktivaĵojn?" havas korolarion: "Daŭri kun kiu?" Ĉar pli kaj pli malamultaj estas la volontuloj por zorgi pri la administrado, kultura kaj materia, de la staĝoj. Laciĝo aperas kaj necesas novaj volontuloj por antaŭeniri!

Vigla diskutadop okazis rilate la tri proponojn. Kelkaj ĉeestantoj firme subtenas la unuan; ili tute ne akceptas la eventualan vendon de la kastelo kaj rimarkigas, ke la punktoj 1 kaj 3 ne kontraŭas unu la alian. Tiun rimarkon la plimulto da ĉeestantoj akceptas. Konsekvence la propono 2, kvankam akceptita de 47 procentoj el la voĉdonintoj ne estas konsiderata elektita. Neniu el la tri proponoj estas akceptita. La prezidanto insistas pri la financa aspekto: necesas elspezi tre grandans sumon, kiu superigas niajn eblojn. Ni necese devas fidi la donacojn. Ĉu sufiĉos? Ĉar la prizorgaj necesaj elspezoj daŭre prezentiĝos. La kasistino rimarkigas, ke nia disponebla propra mono ne sufiĉos por pagi la venontjarajn neeviteblajn elspezojn.

Balotado: voĉdonado pri la tri proponoj: 1: 48 v., 2: 98 v., 3: 64 v. el 210 voĉdonintoj. elekto de la duono de la komitatanoj; validas 221 voĉdonoj el 232. Estis elektitaj (laŭ alfabeto vico: D. Babin (199), H. Boyet (149), C. Bureau (119), L. Lagrange (176), M. Th. Lloancy (132), P. Naulet (165), Ch. Rivière (126)).

Je la 20.h. la prezidanto anoncas la finon de la kunveno.

La kunvensekretario;

Jean Ripoche.

La kunveno malfermiĝas je la 10-a; sekretarias H. Boyet. La prezidanto informas pri la akcidenta morto de Monique Dairon, edzino de nia fidela amiko, sekretario.. La komitato adresas elkore amikajn kondolencojn al la tuta familio Dairon.

D. Babin bonvenigas la novajn membrojn: M. Th. Lloancy, C. Bureau, Ch. Rivière.

Ĉeestas: D. Babin, H. Boyet, C. BUreau, D. Gourdon. G. Lagrange, M.T. Lloancy, P. Naulet, C. Rivière, J. Vincent. Senkulpigis: S. Bourrot, G. Dairon.

La rezulto de la voĉdono pri la tri proponoj rilate la estonton de la kastelo montras, ke neniu el ili ricevis la plejmulton de la voĉoj.D. Babin ne favoras la daŭrigon de la aktivado en la kastelo pro tro pezaj ŝarĝoj: konstantaj prizorgaj laboroj kaj funkciĝo de la sekurecaj instalaĵoj. Ekestas diskuto, ĉu oni rajtas uzi la mondonacojn por nur parto de la necesaj laboroj, sen certeco atingi la finon, do sen certeco ricevi la permeson malfermi la kastelon. G. Lagrange precizigas, ke pluraj donacoj estas firmaj kondiĉe, ke oni uzu ilin por la koncernaj laboroj. La plimulto decidas eventuale uzi parton de la donacoj. Diversaj proponoj faritaj perletere estas studataj

Necesas studi la nunajn statutojn laŭ ĵura kaj imposta vidpunktoj por scii ĉu ni rajtas asociigi la asocion kun eventuala partnero. La komitato konsentas elspezi 5000 frankojn por tiu studo fare de societo Ferré. Oni ankaŭ studas la eblecon organizi staĝojn aliloke ol en Grésillon por daŭrigi la aktivadon kaj enspezi monon dum la daŭro de la necesaj laboroj. Pluraj eblecoj prezentiĝas Oni ekzamenas la eblecon efektiviĝi la laborojn laŭ etapoj, ekzemple ne uzante la duan etaĝon. Estas decidite fari esploron kun kalkuloj pri minimumaj laboroj por certigi loĝadon kaj kursĉambrojpor la venonta somero. La firmao Proteg, kiu instalas la alarmsistemon proponas funkciitan kontrakton: unu vizito jare por 3600 frankoi (sen taksoj) plus urĝeca valizo por 2100 frankoj (sen taksoj). Oni enketos ĉu firmao Socotec proponos pli favoran prezon. EDF proponas instali deekstere konsulteban konsumkomputilon por faciligi la kontrolon: kosto: 600 frankojn La komitato decidas atendi. Ch. Rivière petas de la komitato la permeson uzi foton de la lageto de Grésillon por ilustri lian tradukon de la verko de Hervé Bazin "La verda Preĝejo".

Elektio de la estraro: Neniu kandidatiĝas por la prezidanta posteno. D. Babin precizigas, ke li ne povas defendi daŭrigon de la aktiveco en la elektita direkto. La kasistino denove insistas pri la financaj riskoj. La elekto de nova estraro estas prokrastita ĝis la venonta kunveno. P. Naulet konsentas zorgi pri ka "kurantaj" aferoj. La kasistino zorgos pri la kontado ĝis la elekto de nova estraro.. Venonta kunveno okazos la 17-an de januaro en Bouresse.

La kunvensekretario: Henri Boyet

NIA LIBRO-SERVO

Jen la ĝusta momento por donaci librojn al viaj gekorespondantoj. Vi povas elekti el inter niaj novaj akiraĵoj: Mendo de S-ino J. Vincent, 26bis rue de Milngavie 49150 BAUGE Vi pagos post ricevo de fakturo.

Sezaranoj miaj fratoj! (tr. Ch. Rivière)	60 fr.
Mini-guide Esperanto	20 fr.
La besto de Vakareso (tr. J.L. Tortel)	42 fr.
La ĉashundo de Baskerviloj	63 fr.
Amparolo (I. Nemere)	44 fr.
La dua invado de marsanoj	42 fr.
La fora ĉielarko	53 fr.
Katorelo	49 fr.
La neĝa blovado (Puŝkin)	12 fr.
Tien (Valano)	79 fr.

GRAMATIKO PER BONHUMORO



PRETER - 1) Prepozicio montranta objekton aŭ lokon, en kies proksimeco iu aŭ io pasas, irante plue.


2) Prefikso signifanta a) ke oni lasas flanke objekton aŭ lokon, irante plue ; b) ke oni lasas flanke iun aferon pro malatento aŭ malŝato.



- Ne, mi ne povas preterlasi la okazon !



Donu al mi tiun vinon, dank'al kiu mia edzo ne pretervidas min.



- Ne, ne ! Mi ne preteratentas viajn argumentojn, sed... ĉu vi povus denove telefoni post la televid-programo ?

Niaj perantoj

Aŭstrio : S-ro Johan Wieshofer, Wiener-Reichstrasse, 2, LINZ (250 aŭstr. ŝil.).

Belgio : Librovendejo Kariljono, vzw Doornstraat 22. 2610 Wilrijk Akceptas kreditkartojn - prezo : 600 BEF.

Britujo : Les Hartridge, 74 Devonshire way, Croydon CRO 8 BS (10 pundoj)

Danlando : S-ro Ulrik Rasmussen, Norregardsvej 66, 2610, RODOVRE, Ĝiro 6.83.46 (90 kronoj).

Finnlando : Libra Mendoservo Esperanta, kivistöntie, 05510 Hyvinkää 51 (70 mk.).

Germanio : A. Rudolf, Dochsbergstr. 1, D. 34225 BAUNATAL pĉk Frankfurt / M (2759 35 - 609)

Hispanio : S-ro Francisco Sanchez Anton, Avda Salamanca 10-10-D 03003 ALICANTE - (1 700 peset.).

Italio : Itala Interlingvistika Centro, via Pantano 17, 20122 Milano - pĉk : 42 37 12 03 Literatura Foiro (20.000 liroj).

Japanio : S-ro Tara Nišiumi, section Seiyoshi, ĉhuo-Universitato, 742 Higaši-Nakano, Hatiōziši TOKYO-

Jugoslavio : Jelena Andjelkovic, Nova 61/1, YU-11213 Beograd

Nederlando : Gerard van der Horst, Hengelolaan 1158, 2544 GT DEN HAAG poŝtkonto : 39743. (28 fl.).

Nov-Zelando : Sino Gwenda Sutton, 12 c Herbert Gardens, 186 The Terrace, Wellington 1 (aerpoŝte : 18 n.z.dol).

Pollando : Pola Esperanto-Asocio, ul. Krucza 38/42 00512 VARSOVIO (15 us. dol.).

Portugalio : Portugala Esperanto-Asocio, rua Dr. João Couto, 6, R/C-A - 1500 Lisboa (2.800 esk.).

Svedujo : Sveda Esperanto-Asocio, Södra Rörum, pl. 455, S-242 94 Hörby - p.k. : 2012-3 (80 kr.).

Svislando : Esperanto Perkoresponde, Claude Gacond, strato Chevreuils 14, CH-2300, La Chaux-de-Fonds, PK.23-4669-1 (22 s.f.).

Usono : S-ro Bern Wheel, Books, 834 Wenonah, Oak Park IL 60 304 (15 us. dol. - aerpoŝte : 20 us. dol.).

Aliaj landoj : Ni Serĉas perantojn en aliaj landoj : abonprezo : 15 us. dol. aŭ 25 internaciaj respondkuponoj. Aerpoŝte : 20 us. dol.



KASTELO GRÉSILLON

BAUGÉ

Maine-et-Loire

FRANCUJO

ESPERANTISTA KULTURDOMO

De julio ĝis septembro ĉiulandajn esperantistojn kaj eventuale iajn ajn karavanojn frue anoncintajn

Akceptas :

Por ripozi trankvile en atmosfera frateca ;
Por eklerni aŭ plulerni la internacian lingvon ;
Por ĝin praktiki per interaĝado de ideoj ;
Por aŭdi kulturajn prelegojn ;
Por studi specialajn problemojn ;
Por inter amikoj gaje libertempli ;
Por ekskursi tra centri-okcidenta Francujo.

venu al la esperantista kulturdomo

Kompleta Programo kun kondiĉoj havebla kontraŭ internacia respondkuponon al :
ESPERANTISTA KULTURDOMO, Grésillon, F-49150 BAUGÉ. — Tél. 02-41-89-10-34